Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 7-a de Oktobro 2019

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Mikaelo Lineckij, Dror Gaon, Gabi Zeevi

Protokolo de la pasinta kunsido estas en la retejo – Ne estis reagoj!
http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201909.pdf

1. Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

a) Elekto de dato: en la kluba ĉambro povas okazi lunde, decembro 2 aŭ 9. Ĉu okazigi en la salono? – tio eblas nur en mardoj, 10-an aŭ 17/an. La salono kostos 1,117 NIS, sed ni nuligos la klubvesperon unu tagon antaŭe, do ŝparos 280 NIS. Jehoŝua proponas salonon, ĉar, laŭ li, en Junio estis iom dense, malagrable. Cetere ĉi-foje ni invitu ĉiujn kursanojn. *Voĉdono: unuanime akceptita!* Jehoŝua telefonos al Matilda, kiun mardon el la du ŝi akceptos, kaj laŭ tio mendos la salonon ĉe Efrati.

b) La arta parto: Matilda. Ĉu la oficiala parto estu komence, aŭ en la dua parto, aŭ intermiksita kun la artaj programeroj? – ankoraŭ decidota, sed preferindas la mikso. *Rimarko: post la kunsido okazis reta debato. Doron kaj aliaj pledis forigi la oficialan parton kiu okazu en aparta kunveno, ĉar tio fortimigas la kursanojn kaj la komencantojn. Amri proponis komenci kun la distra parto, kaj okazigi la formalan parton post la paŭzo.*

c) La Ĝenerala Kunveno: raporto de Amri; Jehoŝua dum 5 minutoj; Ŝlomo ne parolos pri financoj. Prezidanto estu serĉata – kiu? (eble Amir? Doron?).

2. Oficejo (Ŝlomo)

Dum du jaroj li serĉis kaj ne trovis taŭgan solvon. Plie, nun ni ne havas regulajn enspezojn, kiuj povus kovri monatajn repagojn de prunto. Du prononoj: 1. Ŝlomo daŭrigu serĉi! 2. En la ĝenerala kunveno ni levos la eblecon aĉeti (aŭ lui?) NUR magazenon por la libroj ĉe Jinon kaj Doron! Oni devos voĉdoni pri tio. *Argumentoj*: a) Tiuj libroj estas nia kultura trezoro, kaj ili povus esti subite forĵetitaj en granda kvanto de hodiaŭ ĝis morgaŭ; b) Magazeno kostos malpli ol oficejo kaj kunvenejo, ĝi ne devas esti vere en la centro, nur en facile alirebla proksimeco; c) La Registristo kontentiĝos per nia aĉeto, li ne esploros, ĉu ĝi havas oficejan agadon en ĝi (unu tablon kaj fotelon), kaj ni ne akumulis nian kapitalon sencele.

Post-kunsida aldono: Amri kontraŭas la proponon aĉeti magazenon. *La kontraŭ-argumentoj*: a) Se ni aĉetos magazenon, ni nuligos niajn ŝancojn iam aĉeti oficejon, kiu kaj enspezigos kaj eble povos servi kiel kunvenejo/kursejo, eventuale ankaŭ kiel magazeno; b) La nuna situacio kiam la Dratverejo ne enspezigas, estas provizora; c) Kiam aperos la bezono transigi la librojn de Jinon kaj Doron, eblas lui magazenon. ĉ) La Registristo ne devigas nin aĉeti ion ajn, nur raporti pri niaj serĉoj.

Jam dufoje ni trovis taŭgajn ofertojn, sed ili malsukcesis en julio 2018 pro la interveno de Amir kaj manko de subteno de la aliaj estraranoj (malgraŭ la decido aĉeti), kaj en aprilo 2019 pro la ĉeso de regula enspezado pro la nepaganta luanto.

2/...

3. <u>Dratverejo</u> (Ŝlomo)

a) Estis proceso en la juĝejo, sen la partopreno de la luantoj (Ŝlomo ĉeestis). Nun ni atendas la verdikton (pri la evakuo), kiu okazos sen la partopreno de ambaŭ flankoj. La monaj aferoj (niaj postuloj) bezonos plian, alian proceson.

b) La Ekzekucia Instanco (הוצאה לפועל) sendis al la luantoj registritan leteron, sed ili ne prenis la avizon pri ĝi, nek iris al la poŝto ricevi ĝin. La letero revenis – al Ŝlomo(!) – kiu NE malfermis ĝin. *Rimarko: Ne estis diskutite kion fari por antaŭenigi la aferon. Tamen ELI ne povas resti en tiu situacio, ĉar ni perdas pli ol 3,000 NIS ĉiumonate!*

4. <u>Israela E-isto</u> (Mikaelo)

a) 70% de la materialo estas preta.

b) Mikaelo atendas la liston de la ricevontoj de Jehoŝua.

5. <u>La venonta(j) kurso(j)</u>

a) Eldad skribis leteron al la Estraro (laŭtlegita!). Li kontentos pri 7,000 NIS por la kurso, ĝis 20 gelernantoj (kun 17% VAT tio estos 8,190 NIS, li kvitancos ĝin).

<u>Posta aldonaĵo de Amri:</u> En la junia kunsido (punkto 5/c) estis decidite:

“Propono: estonte la pago al la kursinstruisto estu surbaze de la enspezoj pro la kurskotizoj; *Voĉdono: unuanime aprobita!”*

La decido estis rekonfirmita en la septembra kunsido (punkto 7). Sekve Eldad povos ricevi la petitan sumon, nur se aliĝos kaj pagos sufiĉe da lernantoj. Ekzemple: se la kotizo estos 600 NIS kaj pagos 12 personoj, la pago al Eldad povos esti nur 7,200 NIS. ELI pagos la reklamkostojn (ĉ. 5,000 NIS). Necesas tion komuniki al Eldad kaj certiĝi ke li konsentas, antaŭ ol oni devontiĝas al kurso kaj elspezas por reklami!

b) Ni devus komenci jam post la festoj – se estus jam sufiĉe da gelernantoj.

c) Necesas reklami rapide, en la Ha-Aretz (Galerio) – kiu faris tion lastjare? Amri reklamis malmultekoste en FB, - ripeti!

6. <u>Prezidanteco de ELI</u>

Amri anoncis, ke pro lia nova respondeco kiel estrarano de UEA, kaj ĉar jam pli ol dek jarojn li plenumas la taskon, li ne rekandidatiĝos venotjare. *Decido: ni devas pripensi diversajn solvojn, proponojn, kaj pridiskuti venontfoje.* Oni NE devas decidi pri la elektita persono dum la Ĝenerala Kunveno, nur pri la estraranoj, - kaj ili rajtos nomumi el inter si la Prezidanton.

La venonta kunsido: 4-a de Novembro 2019, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi